# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por ESPERANTO

Prezidanto : M. Cuéné, 59, rue des Trois-Châteaux - 68-COLMAR
Vic-Prezidanto (junularaj aferoj) : R. KUBLER, 20, rue du Ruisseau - RODEREN- 68-THANN
Sekretario : J.P. COLNOT, 15, rue de Lavaux - 54 - LAXOU
Kasisto : J. CHAPELLIER, 109, avenue dela Malgrange - 54 - JARVILLE
CCP : 399-75 NANCY

N° 64 Junio 1970

## Raporto pri la 20a Orientfranca Esperanto-kongreso okazinta en EPINAL la 26an de Aprilo 1970

Cirkaŭ 40 personoj partoprenis nian kongreson, tio estas tre bona cifero por tia kunveno en Loreno kaj sukceso por niaj afablaj epinalaj organizantoj. Kutime nur en Alzacaj kongresoj ni povis havi similan aŭ superan nombron da kongresanoj. Oni notis partoprenantoj el Colmar, Epinal, Jarville, Strasbourg, Mulhouse, Lièpvre, Sélestat, Riedisheim, Creutzwald, Lingolsheim, Cornimont, Vieux-Thann, Danjoutin, Mattaincourt, Laxou, Trois-Epis, Malzéville, Lunéville kaj... Tokio !

Post malfermo de la kongreso fare de Sro Cuéné, Federacia Prezidanto, Sro Bergerot salutas la kongresanojn kaj poste prezidas la debatojn.

Oni legas plurajn salutleterojn - Sro Colnot prezentas la aktivecan raporton, kompletigante ĝisdate la tekstojn jam aperintajn en la Informilo n° 63. Sro Chapellier prezentas la kasraporton : ni havis en kaso 584,88 F kaj enspezis 540,40 F - sumo = 1125,28 F. Ni elspezis nur 272,12 F (duonon de la enspezoj), restas do en Kaso : 853,16 F. Ambaŭ raportojn aprobas la ĉeestantoj.

La diversaj aktivuloj donas precizigojn kaj kompletigojn al la raportoj, kiuj jam aperis en la Informilo. Pri Strasburgo raportas Sro Zipfel : la organizo de la dulanda kongreso donis profiton, kies parton ricevis la loka grupo. Sekve al la vintraj kursoj, oni kalkulas en Strasbourg 11 novajn diplomitojn. Okazis dum la pasinta jaro, kaj okazos denove (la 19an de majo kaj 15an de septembre) kampofajroj. Kunvenoj okazas regule, oni festis Zamenhoftagon, diplomdisdonon, diapo-projekciadon, KTP. Oni restarigis E°-bibliotekon kun cento da libroj, kaj revuoj. Tamen bremso : la registara decido plivigligi la uzadon de la franca lingvo.

Pri Colmar raportas Sro Cuéné : post vintro malbona por ĉies sano, restas 6 personoj en la kurso. Pri Mulhouse, Sro Lienhardt : la esperanta vivo ne estas malpli brila ol aliloke : kurso okazis en la popoluniversitato sub gvidado de Sino Hervé, 8 lernantoj aliĝis, 3 finis la kurson. Kunvenoj okazas en "Salle des Sports", 1, rue Pierre Curie, marde vespere. La loka gazeto "L'Alsace" estas favora. Pri Creutzwald : Sro Manceau laboris ĉefe pri teknikaj verkoj, recenzoj por UFE. Li interesiĝas pri teknikaj fakdelegitoj de UEA. Pri Nancy : la korespondа kurso bone funkcias. Sed parolaj kursoj malsukcesis kaj kunvenoj ne plus okazis ĝis marto.

Oni "renovigas" poste trionon de la komitato. La 4 elirantaj komitatanoj rekandidatiĝas, kaj, ĉar estas neniu nova kandidato, ili estas unuanime elektitaj.

.../...

---

KOTIZOJ 1970 - Atentu bone !

Se kruceto troviĝas en la apuda kadreto, tio signifas ke la kasisto de la Federacio, Sro Chapellier Jean (adreso supre) ankoraŭ ne ricevis vian kotizon 1970. Li estus al vi dankema se vi bonvolus sendi al li senprokraste tiun kotizon elektitan en la aldonita tabelo. Tutkore li antaŭdankas vin !

---

ESPERANTO-KURSO en REGIONA GAZETO.- La regiona semajna gazeto "La Presse de Gray" legata en granda parto de la departemento "Haute-Saône", komencis en pasinta aŭtuno la Publikigon de Esperanto-kurso por siaj legantoj ! Tiun kurson ni ŝuldas al la agema delegito de U.E.A. en Gray, s-ro Geo JUNIER, kiu mem redaktis la kurson kaj zorgas pri korektado de la taskoj de la lernantoj. Ni esperu ke tiu kurso, efika propagando en la gray'a regiono, entaŭenpuŝos Esperanton en tiu najbara departemento. Ni aldonu ke nova strato en Gray ricevos la nomon " Dro ZAMENHOF " kaj ke de kelkaj jaroj, esperantaj standardoj flirtas en la urbo proklamita " Internacia esperantista rendevuejo ".

La kongresanoj studas poste la agadan kaj financan raportojn de UFE. Ni konstatas konkretan rezulton : la financoj estas en ordo. Sed la revuo ŝajnas malregule atingi la membrojn, ĉar pluraj ĉeestantoj ne ricevis la lastan, aŭ eĉ la du lastajn numerojn. Tial la 2 raportoj estas aprobitaj sed kun 2 kontraŭaj voĉoj. Estiĝas krome protestoj kontraŭ la apero, ĉe la frontpaĝo de la revuo, de la lasta artikolo de Sro Bourdeaux, kiu impresas malfavore la membrojn. El la diskutoj sufiĉe viglaj kiuj sekvas, kaj el letero kiun sendis Sro Wermelinger (kiu ne povas ĉeesti) rezultas 3 rezolucioj (kies tekstojn vi trovos pli poste), kaj ankaŭ propono. Ni decidas proponi la kandidatecon de Sro Wermelinger al la Nacia Konsilio, kondiĉe ke li mem akceptu poste letere kandidatiĝi. Se li ne akceptos, ni voĉdonos por la 8 kandidatoj anoncitaj de UFE. (Sro Wermelinger rifuzis, tiel la voĉdono de nia Federacio estis unuanima por la 8 kandidatoj).

Sino Oehri (Strasbourg) reprezentos nian Federacion en Monte-Carlo ĉe la Nacia Kongreso.

Komuna tagmanĝo kunigis ĉirkaŭ 35 personojn. Poste okazis ekzameno kun 6 gekandidatoj, kiuj ĉiuj sukcesis la "ateston pri lernado". Pluraj personoj visitis kun Sro Bergerot modernan konstruejon, aliaj vizitis la forsteran foiron. Sro Manceau prezentis diapozitivojn pri la 2 Esperanto-feriejoj en Jugoslavio, Volparija kaj Primoŝten. Kaj komitata kunveno renovigis la estraron.

La proksima Federacia Kongreso okazos en Guebwiller.

J.P. COLMOT

-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-"-

Konsisto de la Federacia Estraro kaj Komitato por 1970 :

Prezidanto : Sro Cuéné (Colmar) - Vicprezidanto (Junularaj aferoj) : Sro Roland Kubler (Roderen). Sekretario : Sro Jean-Paul Colnot (Laxou). Helpsekretariino : Fino Anna Jacquot (Epinal). Kasisto : Sro Jean Chapellier (Jarville). Helpkasisto : Sro André Grossmann (Danjoutin). Membroj : Srojpol DENIS (Bar-le-Duc) - Robert Durand (Epinal) Sino Claude Hervé (Wittenheim), Sroj Fernand Knecht (Strasbourg), Jacques Manceau (Creutzwald) Eugène Wermelinger (Buhl).

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Rezolucioj aprobitaj dum la kongreso en Epinal :

1°/- ĉiam mankas en nia lando taŭga informbroŝuro pri Esperanto, kiel tion efektivigis la germanoj, svisoj, italoj, k.t.p. Car ni pensas ke tio estas gravega manko por niaj aktivuloj, ni sugestas ke UFE priatentu tiun aferon.

2°/- Ni sugestas ke en "Bottin", oni povu trovi la adreson de UFE sub la nomo "Esperanto" (Union française pour l'), ĉar persono kiu ne konas Esperantujon ne povas diveni ke ĝi situas sub "Union".

3°/- Ni sugestas, ke Franca Esperanto Instituto sendu gratulleteron al la sukcesintoj de ekzamenoj (laŭ decidoj de la strasburga kongreso).

ESPERANTO-EKZAMENOJ

Dum la kongreso en Epinal, sukcesis la ekzamenon de atesto pri lernado kaj ricevis la diplomon :
- S-ino LERCH Denise (Mulhouse) - S-ino RISS Yvonne (Colmar)- Fino BOLLENBACH Ilse (Trois-Epis). Gesinjoroj KIRCHGESSNER (Riedisheim) - Sro REITTER Alphonse (Lièpvre).

En Nancy, sukcesis la ekzamenon : S-ino Christiane STENGEL (kun cito "bone") Gratujojn al ĉiuj sukcesintoj !

- - - - - - - - - - - - - - - -

LA VORTO DE LA PREZIDANTO

La kursoj mortis..... Vivu la kursoj !
La kursoj kiuj funkciis dum la vintra sezono nun finiĝis plejparte. Iliaj gvidantoj estas kontentaj pri la farita laboro, precipe se ili povas disdoni multajn "Atestojn". Ke ili permesu al la prezidanto, en la nomo de nia Federacio, gratuli ilin kaj danki.

Sed la tuta tasko ankoraŭ ne estas finita, kaj ni ne forgesu : semu, semu konstante...! Jam de hodiaŭ ni devas pensi al la venonta sezono. Ĉiu el ni, kaj tio koncernas ne nur la kursgvidantojn sed ankaŭ ĉiujn aliajn gesamideanojn, devas okupiĝi pri tio.

La venonta libertempo estos bona okazo por Esperanta agado. Ne gravas ĉu la homo, kiun vi kontaktos, loĝas, aŭ ne, en via urbo kaj povos do estiĝi lernanto ĉe vi... aliaj amikoj faros la saman je via profito.

...

Ĉiam kaj ĉie kunportu vian verdan steleton en via butontruo. Ĝi, tre ofte, vekas la scivolon de viaj kunuloj. Estas tiam facile longe klarigi nian aferon kaj ne malofte vi sukcesos havigi al ni novan samideanon. Tio estu mia bondeziro por vi.

Al ĉiuj, sunplenajn feriojn, al kelkaj, kiujn mi esperas tre multnombrajn, ĝis la revido en Vieno !

CUEME M.

NIA FAMILIA RONDO :

Esperanto = Edzperanto !

- Ni havis la ĝojon eksciii pri la esperanta edziĝo de la aktiva kasisto de JEFO, André Grossmann el Vieux-Thann, kun F-ino Masako Okino, el Tokio. La geedziĝa ceremonio okazis en Vieux-Thann la 9an de majo. La junaj geedzoj konatiĝis dum la lasta Universala Kongreso enHelsinki. Esperanto estas vera ilia komuna lingvo, ĉar S-ino Grossmann ankoraŭ ne scipovas la francan ! Ĉiuj kongresanoj en Epinal, ĉiuj partoprenintoj en La Hingrie, kiuj konatiĝis kun tiu simpatia paro, certe kun mi deziros al la novaj geedzoj longan peresperantan feliĉon.

Nova (provizora) adreso de la JEFO-Kasisto : 6, rue Dr.Fréry-90 DANJOUTIN.

- - - - - - - - - - - -

- En Laxou, geedziĝis la 21an de marto lernintino de la koresponda kurso, F-ino Monique Cavadini, kun S-ro Sylvain Arnoux. Ambaŭ geedzoj estas geinstruistoj, kaj Monika jam ekinstruis Esperanton al sia edzo ! Gratulojn kaj bondezirojn !

- - - - - - - - - - - -

Naskiĝo :

- Dum la Federacia-Kongreso, ni eksciis pri la naskiĝo en la hejmo de Gesinjoroj Wermelinger en Guebwiller-Buhl, la 23an de marto, de Daniela Aminda. Certe ĝojas pri tio la fratetoj Francisko kaj Mikaelo. Laŭdire jam krias internacie la nova denaska esperantistino ! Gratulojn al la gepatroj kaj bondezirojn alla bebo.

oooooooooooooooooo

MAJA FEDERACIA RENKONTIĜO

En aero pura kaj malpeza, inter montoj kaj valoj verdaj je herboj,abioj kaj fagoj, ni kunvenis la 24an de majo.

Vi sendube rekonis la lokon de nia Federacia renkontiĝô en la Hingrie. En tiu bela dimanĉo, la vetero favoris nin, kvankam freŝa venteto devigis, almenaŭ dum la mateno, la ĉeestantinojn kaŝi siajn ŝultrojn.

Car la montoj ombris matene la domon, ni iris promeni sur la suna flanko : bona kaj sana aperitivo antaŭ la manĝado. Eĉ,du ĉagrenitaj patroj ricevis duoblon de tia aperitivo serĉante kaj vokante siajn etulojn, kiujn ili kredis perditaj en la arbaro. Post la manĝado, la suno pli firme varmigis ĉiujn kaj gaje ni babilis kaj ludis ; kelkaj eĉ laboretis sub la duonsevera gvido de nia kara Prezidanto. Ili konsentis, laŭ propono de la Prezidanto ke Strasburganoj helpos al la redakcio de la Informilo. Do, de nun, ĉiuj grupoj aŭ izolulo j el Alsaco kaj Belfort sendos siajn artikolojn al Sro F. Knecht ; la aliaj, kiel kutime sendos ilin al Sro Colnot. Kaj la sendaĵoj alvenu antaŭ la fino de tiuj kvar monatoj :

FEBRUARO MAJO SEPTEMBRO kaj NOVEMBRO.

Ni esperas ke nia nova Informilo fariĝos tiele amika ligilo inter ĉiuj federaciuloj, kaj utila ilo por ĉiuj aktivuloj.

Ni foliumis la novan kurson kompilitan de Sro Wermelinger ; ĝi estas rekta metodo kaj ni konsilas al vi ĝian studon.

Dum tiu renkontiĝo, ni havis la plezuron akcepti kaj gratuli la ĵus geedziĝintajn gesamideanojn GROSSMANN. Pluraj ĉeestantoj iris sia vice babili kun Sino GROSSMANN, eble por provi sian scion de la lingvo. Ni akceptis ankaŭ lernanton de la perkoresponda kurso, ĵus sukcesintan ekzamenon de Atesto pri Lernado ; li loĝas en la najbara vilaĝo Liepvre kaj ricevis sian diplomon el la "Prezidantaj manoj".

Ni estis malpli nombraj ol dum la antaŭaj renkontiĝoj ; tamen mi kalkulis proksimume dekses plenkreskulojn kaj ok infanojn. Gesinjoroj Zipfel, kiel kutime akceptis nin afable kaj ili eĉ pendis super la enirejo nian federacian flagrubandon.

La Strasburganoj deziras ke proksiman jaron ni estu tre nombraj por kune kaj samideane saluti la printempon dum la antaŭ lasta dimanĉo de majo 1971. Ĝis do.

F. KNECHT.

...

IMPRESOJ DE NOVA ESPERANTISTO :

Renkontiĝo de esperantistoj en la Hingrie

Sabaton 23an kaj dimanĉon 24an de majo, la esperantistoj de la Orient-franca Federacio kaj iliaj familioj renkontiĝis en la Hingrie. Oni povas tien iri laŭ la strato Lièpvre, Rombach-le-Franc, la Hingrie aŭ ankoraŭ tra la monto, piede. Estas loko tre rekomandata al la kompatindaj personoj de la urbo kaptitaj dum la tuta semajno en la rondo de agititoj.

La suno ankaŭ partoprenis kaj ĉiuj estis feliĉaj. En la familia domo estas litoj, mebloj, kuirejo, k.t.p.... je la dispono de la membroj.

Dimanĉon, post la matenmanĝo, sportoj, ludoj, muziko antaŭis la disdonon de la diplomo de atesto pri lernado al Sro REITTER el Liepvre, kun ĉiuj kutimaj ceremonioj. En sia parolado, la prezidanto, Sro Cuéné kuraĝigis la novan diplomiton persisti en tiun vojor Poste, la diversaj respondeculoj traktis la problemojn de la Federacio.

Je la horo de la disiĝo, oni forlasis sin en espero de baldaŭa revido.

REITTER, 24,rue St-Antoine, 68-LIEPVRE.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

EKSKURSOJ :

Car tre malmultaj interesiĝantoj anoncis sin, programo de ekskursoj piedaj aŭ aŭtomobilaj ne ekzistas por la nuna jaro. Laŭ interkonsento kun Sro Knecht en La Hingrie, ni rendevuis la 21an de junio. Je la 10a horo, ni renkontiĝos ĉe la stacidomo en Etival-Clairefontaine, kie ni kunprenos en diversaj automobiloj gesamideanojn kiuj alvenos trajne el Nancy. Ni veturos poste al Senones, piede ni supreniros ( 1 H.1/2) al "Roche Mère-Henry kaj "Mont-Pelé". Manĝoj el la sakoj. Tiam ni verŝajne decidos pri postaj aliaj ekskursoj. Eventualaj interesatoj bonvolu skribi al ni aŭ al Sro Knecht.

J.P. COLNOT.

NIA PROKSIMA INFORMILO aperos en Oktobro, se sufiĉe da teksto atingos nin plej malfrue la 30an de septembro. Aktivuloj bonvolu konigi al ni siajn planojn por aŭtuna kaj vintra agado. Ne estas tro frue por pripensi tion, ĉar bone preparita agado pli certe sukcesos ! Komprenoble, al ĉiuj ni deziras ripozigajn feriojn. Al tiuj, kiuj pasigos agrablajn tagojn en Esperantujo, ni alvokas por ke ili sendu al ni raporton (ne tro longan), ĉefe por konigi al novuloj la fratecan etoson kiu regas en niaj kongresoj kaj ferioj. Ni mem pasigos 2 semajnojn en la Esperanto-feriejo en Volparija (Jugoslavio). Personoj kiuj dezirus tie ferii bonvolu skribi al mi por informoj. Oni sciu ke kompleta pensiono en tiu hotelo kostas 3,60 usonajn dolarojn tage (iom pli ol 20 frankoj), kun ebleco pri rabato je 30 ĝis 50 % por infanoj.

Tio estas plia instigo por ferii ĉe la dolĉa Adriatika maro, kaj en esperantista etoso !

J.P. COLNOT

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

La Esperanto-Vivo en...

NANCY - Post interrompo dum 9 monatoj, la esperanto-kunvenoj rekomenciĝis en la Junuldomo. Kunvenis la 12an de marto 6 personoj, la 14an de aprilo : 5, kaj 9 la 14an de majo. Ni esperas ke ni sukcesos restarigi la esperanto-vivon en la Junuldomo ekde oktobro proksima.

NANCY - Korespondа kurso -

Se kunvenoj kvazaŭ mortis, la korespondа kurso vigle funkcias, sed kvazaŭ tuta dank'al kunlaborantoj ekster la Nancia Junuldomo ! Aktuale, ni kalkulas 36 novajn lernantojn de post oktobro. 6 gesamideanoj aktuale lernas la superan kurson.

Inter la novaj lernantoj, 2 jam finis la unuagradan kurson : Sro Pierre GERARD en 70-JUSSEY,gvidita de Sro Bergerot (Epinal), kaj Sro Alphonse REITTER en 68-LIEPVRE, gvidita de Sro Zipfel (Strasbourg).

J.P. COLNOT

12-a EUROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO

La sukcesoj en la du lastaj jaroj kuraĝigis la respondajn funkciulojn de Svisa Asocio de ESPERANTO-Fervojistoj (SAEF) refoje,en la ĉarma feriejo Gwatt, realigi la 12-an Eŭropan Ferio-semajnon (EFS) ĉe la lago de Thun de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1970. La belega situo kaj la bonega kuirejo de la feriohejmo garantias pri agrabla restado kaj la zorgeme elektitaj ekskursoj al la mondfama montarregiono "Berna Oberlando" signifos por partoprenantoj de ĉiu aĝo kaj profesio neforgeseblan travivaĵon. Detalan informilon kaj senkostajn bildprospektojn oni petu ĉe la sekretario : Ernst GLÄTTLI, Laurstrasse 17, CH - 5200 BRUGG (Svislando)